

Kontrakto pri kunlaboro koncerne instruistan trejnadon inter la Interlingvistikaj Studoj de UAM kaj ILEI

La Interlingvistikaj Studoj de UAM, Poznan (IS) kaj ILEI (Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj) konsideras tre grava la trejnadon de instruistoj de esperanto.

IS ofertas tri jaran postdiploman studadon kun specialiĝo en la 3-a jaro pri lingvopedagogio por estontaj esperanto-instruistoj. Tiu programo estas la bazo por instruista trejnado en internacia nivelo.

IS kaj ILEI decidas kunlabori en la pluevoluigo de la lingvopedagogia specialiĝo. Tiun komunan programon ILEI akceptas por instruista trejnado kaj eldonos internacian instruistan diplomon por tiuj kiuj plenumas la postulojn de la trejnado.

La du institucioj kunlaboras ankaŭ en la realigo de instruista trejnado. Temas pri komunaj trejnsesioj en UAM, Poznan kaj pri ilia realigo en aliaj lokoj, kiuj plenumos la poste difinitajn kondiĉojn. La dumsemestra laboro okazas per la helpo de retroŝtado.

La komenco de la kunlaboro estas la studjaro 2007/2008.

Radojica Petroviĉ
Prezidanto de ILEI

dr Ilona Koutny
gvidanto de la Studoj

Aldonaĵoj:

1. Priskribo kaj kondiĉoj de la instrusta trejnado
2. Programo de la instrusta trejnado

1. Priskribo kaj kondiĉoj de la instrusta trejnado

Enhavo de la trejnado

A) Metodika trejnado

Min. 4 x 10-hora ĉeesta kursaro, kiu egalvaloras al 120-hora lernado (proponata estas 2 unusemajnaj sesioj aŭ ev. 4 semajnfinaĵoj), provizora temaro aldonita.

La restanta parto inter la sesioj okazas en reta kontakto.

Necesas instrupraktiko (surloke aŭ aux per filmita leciono).

B) Lingvistika kaj kultura kompletigo

e-literaturo koncize;

e-lingvistiko koncize;

konciza historio de e-movado (ankaŭ planlingva fono).

C) Lingva kontrolo kaj helpo

Komence de la studado kontrolo de lingvonivelo.

Kaze de mankoj, reta lingva trejnado kaj surloka kompletigo.

Rezulto

La progreso de la partoprenantoj estos kontrolata per difinitaj taskoj (kreo de ekzercoj, analizo de lerniloj, ktp), per surlokaj ekzamenoj kaj modellecionoj.

Por akiri la instruistan diplomon de ILEI, la partoprenantoj devas pretigi diplomlaboraĵon (ĉ. 25 paĝan) kaj prezenti ĝin enkadre de la fina kompleksa ekzameno (kie krom metodiko estos demandoj pri e-kulturo) – postuloj ellaborataj dum la studjaro 2007/08 .

Post sukcesa plenumo akiro de la internacia instruista diplomo de ILEI.

Kondiĉoj

Komence: lingvonivelo min. B2 (laŭ la nova internacia taksado);

Fine: lingvonivelo min. C1.

Posedo de abiturienta ekzameno (aŭ egalvalora)

Realigo

La unuan fojon en Poznan enkadre de la Interlingvistikaj Studoj, en 2007/08,

Ellaborantoj kaj instruantoj de la metodika trejnado: dr Katalin Kováts (prizorganto de la retejo Edukado.net, programgvidanto de la Lingvopedagogia specialiĝo de IS), mgr. Maria Majerczak (metodikisto en la Jagiellona Universitato, Krakovo, lekciisto de IS), dr Ilona Koutny (gvidanto de IS), mgr. Zsófia Kóródy.

Kunmeto de listo de deviga studmaterialo ellaborata dum la studjaro.

La programo estas transportebla al aliaj landoj, se certaj kondiĉoj estas plenumataj

(priparolota) laŭ la konsento de la supra programkomitato pri la aliloka realigo kaj aprobo de aldonaj instruantoj.

2. Programo de la instruista trejnado

(Surbaze de la programo realigata kadre de la specialiĝo pri Lingvopedagogio en UAM, ellaborita de Katalin Kováts, Maria Majerczak kaj Ilona Koutny)

Bazaj faktoroj de lingvopedagogio: 1a semestro (10 h.)

1. Historio de la metodoj de lingvoinstruado (Tradiciaj kaj modernaj metodoj, specialaj metodoj por la E-instruado, inkl. komunikan metodon);
2. Psikologiaj faktoroj de la lingvoinstruado (rolo de instruisto kaj lernanto, procezo de lernado, taŭgeco de metodoj al aĝo kaj kondiĉoj, ktp);
3. Bazaj kapabloj (legado, skribado, parolo, aŭskulta kompreno) kaj ties evoluigo.

Esperanta metodiko: 1a semestro (min. 10 h.)

1. Evoluigo de kapabloj -- Ekzercotipoj (analizo kaj kreado);
2. Instruado de E-gramatiko;
3. Instruado de vortprovizo, uzo de vortaroj;
4. Instruhelpiloj (kreado, elekto, analizo);
5. Motivigo, mezuro, taksado, ekzamenoj;
6. Planado de kursoj, elekto de lernolibroj, materialoj, planado de lecionoj.

Esperanta metodiko: 2a semestro (min. 10 h.)

1. E-aj legaĵoj, eldonaĵoj, revuoj por lingvolernantoj;
2. Lingvaj ludoj, poemoj, kantoj;
3. Transdono de e-kulturo;
4. Lingvaj interferoj kaj ties instruado,
5. Propedeŭtika valoro de E-instruado;
6. Organizado de la instrulaboro (varbado por E-o, lanĉebloj de E-kursoj;
7. Internaciaj kunlaborebloj, movadaj konoj (Interkulturo, Euroscuola, Flugiloj);
8. Praktika laboro: Modellecionoj.

Instruhelpiloj (sonmaterialoj, filmoj, komputile asistata lingvolernado inkl. Retkursojn): 2a semestro (min. 10 h.)

+ Edukado.net, Lernu ktp.

Deviga literaturo

Kováts, K. (red): **Manlibro pri instruado de Esperanto**. Espero / ILEI - Partizánske / Hago, 2005.

<http://www.edukado.net/katalogo/14235>

Metodikaj artikoloj el IPR: <http://www.ikso.net/ilei/ipr/>

Metodikaj artikoloj en la LEGEJO de www.eduakdo.net

Konsilata literaturo:

Barcsay, Zsuzsa: *Metodiko en la praktiko*. Budapeŝto: HEA. 1982

<http://www.edukado.net/instruilo.jsp?id=152>

Melnikov, Aleksandro: *La ĉefaj principoj de fremdlingvo-instruado*. Rostov-na-Donu, 1999.

<http://www.edukado.net/instruilo.jsp?id=145>

Rakuŝa, Rudolf: *Metodiko de la esperanto-instruado (3a eld.)* Rotterdama: UEA, 1991

<http://www.edukado.net/instruilo.jsp?id=151>

Szerdahelyi, István: *Metodologio de lingvostudado kaj parolalproprigo*. Budapeŝto: ELTE 1981.

<http://www.edukado.net/instruilo.jsp?id=154>